

ČEĀOSLOVAKA
ESPERANTO
REVUO

JARO XIII. NRO 8.
NOVEMBRA N-RO
APERIS 15. XII. 1931

LA PROGRESO



OFICIALA ORGANO DE ĀEĀOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA
REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: PRAHA-VII. SOĀAĀRSKĀ 333

Jarabono (10 numeroj) Kĉ 20.--; fremdlando Kĉ 25.-- (aŭ 4 sv. fr.) Escepto: Aŭstrio, Jugoslavio, Pol-
lando kaj landoj de Stockholma interkosento: 3 sv. fr. Konto de Poŝta Ŝparkaso Praha: N-ro 34.271.

Z ESPERANTSKĀHO SVĒTA

Přední ukrajinskí spisovatelé pro esperanto. Ukrajinské listy uveřejňují prohlášení představitelů dnešního ukrajinského písemnictví, mluvící o nutné potřebě esperanta pro veškeré lidstvo. Petr Panč označuje esperanto pro jeho snadnou naučitelnost za jediný jazyk vhodný pro mezinárodní dorozumívání mezi dělníky a sedláky celého světa. Podobně hovoří Āndrij Paniv ze Svazu seelských spisovatelů „Pluh“. Serhij Pilipenko ohlašuje, že k jeho podnětu vydává státní nakladatelství ukrajinskou antologii v esperantu. O. Dosvitnij píše, že při jeho cestách čínským vnitrozemím a jinými zeměmi se ukázalo esperanto jediným prostředkem k vzájemnému styku, neboť našel téměř všude esperantské skupiny nebo aspoň jednotlivce, kteří ovládali tento jazyk. V. Sosjura navrhuje, aby esperanto bylo ustanoveno druhým státním jazykem. Slavný skladatel V. Kozickij hovoří o překladu oper do esperanta. Následují ještě povzbuzující projevy Ostapa Višnja, V. Gžického, V. Kuzmiče a O. Dončenko.

Záchrana mluvícího filmu v esperantu. Podle zprávy Daily News domnívá se známý Fred Niblo ze společnosti Metro Goldwyn Mayer, že jediný způsob, jakým může být zachráněn pro Ameriku obchod s mluvícími filmy, jest brzké zavedení esperanta za všeobecný mezinárodní jazyk. Společnost jest proto ochotna podporovat esperantské organizace v rozsáhlé propagandě.

Hakenkrajcleři pro esperanto i proti němu. Letošního srpna byl odhalen v lázních Dušňky v Pruském Slezsku pomník autoru esperanta

doktoru Zamenhofovi, jenž tam ztrávil několik svých prázdnin. Druhého dne po odhalení byli překvapeni lázeňští hosté shledavše, že pomník jest zohyzděn nápisem „Smrt Židům!“ jež vryli do kamene horkokrevní hakenkrajcleři. Za tím však obrázkový týdeník hakenkrajclerský Illustrierter Beobachter přináší pod svými obrázky nápisy v esperantu, aby list pronikl i do ciziny.

Esperanto ve službách estonské turistiky. Turistický odbor Esperantského svazu estonského uspořádal minulého léta několik výprav do Estonska, jehož se zúčastnil velký počet zahraničních turistů hlavně ze zemí skandinávských. Byli doprovázeni vůdci znalými esperanta, kteří za podpory místní organizace estonské mohli výborně plnit svůj úkol. Věc se velmi dobře osvědčila a zájem o tyto levné a zajímavé cesty vzrostl tak, že byly najaty pro výpravy i zvláštní parníky ze Švédska do Estonska. Cesty neměly rázu známých výletů, pořádaných cestovními kancelářemi, neboť účastníci se dostali do přímého styku s obyvatelstvem a poznali důkladně lid a zemi. Věc jest sledována estonským ministerstvem zahraničí, které nyní subvencuje tuto užitečnou činnost esperantského svazu.

Vyučování esperantu gramofonem. Velká anglická společnost Linguaphone pojala do seznamu vyučovaných jazyků také esperanto. Celý jazykový kurs vedený předním pedagogem drem Privatem ze Ženevy byl natočen na gramofonové desky. Jakožto kurs pro pokročilé byly vydány další desky s ukázkami esperantského písemnictví.

LA PATRINOJ KAJ LA SENARMIGO.

Mi estas kontraŭ la milito kaj por la senarmigo unue kaj ĉefe pro tio, ke mi havas du filojn, kaj mi timtremus pro ili; kaj ĉar mi estus malfeliĉa, se miaj junuloj mortigadus aliajn junulojn. Vi diros, ke tio estas nenia vidpunkto kaj nenia opinio; jes, nenia. Sed por mi kaj por milionoj da patrinoj de ĉiuj rasoj kaj nacioj tio estas afero de vivo.

Ni, virinoj, havas la civitanajn rajtojn. Ni elektas por la komunumaj estraroj kaj por la parlamento. En asiza tribunalo nia voĉo povas decidi pri la libereco aŭ la morto de la akuzito. Sed povas okazi al ni, ke iun tagon oni devigos nin eldoni niajn filojn por amasa murdado kaj neniuj ideo kapablos konsoli nin pri tio. Ni estus monstraj, se ni sentus alimaniere. Kaj ni promesas, ke ni volas helpi, por ke ne estu milito. La povo ne estas en niaj manoj, sed helpon doni povas ĉiu homo de bona volo; kaj eĉ estus pli bone, klopodi vane (sed mi ne kredas, ke vane) ol klini la kapon, kunmeti la manojn kaj konsenti pri la malbono.

Tio ne estas klopodo kontraŭ la nacio aŭ la ŝtato. Oni amas la landon, en kiu oni elkreskis kaj kun kiu oni kunkreskis; amas ne estas la ĝusta vorto, temas pri io pli forta: oni ne amas la propran okulon aŭ la manon: ili estas memkompreneblaj al ni, parto de ni. Sed ni scias, kiel dum la mondmilito neniuj el la militantaj potencoj komencis la militon; ĉiuj estis atakitaj; ĉiuj — kiel oni scias — estis trude pelitaj militi. Kaj hodiaŭ tute same ĉiuj ŝtatoj armas sole por sin defendi — infekante la najbarojn per la milita atmosfero.

Por la februaro prepariĝas en Genevo la senarmiga konferenco. Bedaŭrinde temas sole pri senarmigo parta; sed estas necese bonvenigi, ke temas almenaŭ pri tia. La Ligo de nacioj estas en la lasta tempo akre kritikata kaj homoj pli kompetentaj, politike spertaj, povas prijuĝi, en kiu grado juste. Videble estos iam iomete pli malfacile kaj pli komplike likvidi la armeojn ol skribi artikolojn pri tio. La Ligo de na-

cioj, la simpla fakto, ke kunvenis la reprezentantoj de la eŭropaj reĝnoj kaj deklaris, unuafoje en la historio, ke la militoj ne necesas esti, kaj ke oni laboros, por ke ili ne estu, signifas historian ŝanĝon en la pensado de la 20. jarcento.

La pensado mem ne sufiĉas, mi scias. La senfrukta entuziasmo por Genevo kiel simbolo (eble ŝanceliĝanta) ne savos nin, mi scias. Sed tamen staras signaloj sur la krucoj de la historio. Ne peki per et-anima apatio.

„Eh, ne ĝenu“, diras homoj. „Militoj estis, militoj estos, sole la pretekstoj ŝanĝiĝas. Por mia persono, mi ne kredas, ke militoj iam malaperos. Ili estas jam en la homa naturo.“

Malaperis hommanĝado, sklaveco, tortura juro, servuto.

Iu tre klera homo klopodis konvinki min, ke la militoj estas profilakto kontraŭ tropleneco de la mondo. Sed en ĉiuj eŭropaj ŝtatoj la ĉesigo de la gravedeco estas punata!

Ni subtenas la vivon de antaŭtempe naskitaj infanoj, ni prokrastigas la morton de maljunuloj je kvaronhoru, ni lastmomente savas sinmortigantojn, ni instruas paroli surdmutulojn, legi blindulojn, kalkuli idiotojn. Sed homojn en floro de la vivo ni intencas sendi al la morto. En la nuna tempo de la fizika kulturo, en la mondo kovrita per sportludejoj, en la belega mondo, kie pli bonaj danĝeroj kaj heroaĵoj atendas al junaj Amundsenoj, Lindbergoj, Piccardoj! Freneza homa societo!

Ni, patrinoj, volas senarmigi.

Marie Pujmanová.

Trad. R. H.

Jam aperis

la intereseĝa libro de

Jan Welzl:

TRIDEK JAROJN EN LA ORA NORDO.

314 paĝoj, 1 landkarto, 1 foto.

Prezo afr. 35 Kĉ.

Mendu!

Mendu!

Mendu!

Imaĝoj de alhemiiŝtoj. (Dr. A. Sommer-Batěk) La teor'oj de la alhemiiŝtoj ŝajnas al ni riĉindaj, sed grajno da vero estas tamen en ĉiu el ili. Cetere eĉ niaj kutimoj estas ankaŭ strangaj kaj post kelkaj jarcentoj nia posteulo eble ne povos kompreni, ke ni povis marŝi sur stratoj kun ardanta volvaĵo da seka herbo inter la dentoj kaj ke ni povis opini ĝuo aferon tiel malsaĝan kaj malutilan. Do ankaŭ ni devas havi toleremon pri la strangaj eraroj de la alhemiiŝtoj. Ili opiniis, ke la ŝtonoj kreskas en la tero, simile kiel la plantoj kreskas sur la tero. Ili opiniis, ke ĉe certa favora konstelacio de planedoj estiĝas metaloj, kiujn ili rigardis jam pli-perfektigitaj ŝtonoj. Dum cirkonstancoj speciale favoraj estiĝas plie la oro kaj arĝento, kiuj estas ankaŭ riceveblaj el ceteraj metaloj per diversaj laboroj alhemiaj. Pro tio ili turnis sian scion por plinobligi metalojn kaj aliŝanĝi ilin je la oro. Tio estis orfarado kaj ĝi obsedis ĉiujn homojn de tiu epoko. Ili kredis, ke patro de la metaloj estas la facile ekbruligebla kaj brulema sulfuro, kaj ilia patrino la plorema hidrargo, ĉar tiu ĉi — kvankam metalo — jam ĉe ordinara temperaturo fluidiĝas en larmoj. Sed ankaŭ stano, plumbo kaj arĝento — kvankam solidaj ĉe ordinara varmo — povas esti devigitaj plori, se oni roŝtas ilin. Tio montras ilian virinan devenon. Ni vidas, ke la tiamaj imaĝoj sciencaj estis pli malpli antropomorfaj, tio estas, faritaj laŭ la homo. Same kiel la homo vivigis por si la tutan naturon per diversaj demonoj kaj dioj, do diverse formitaj estaĵoj homaj, tiel li imaĝis ankaŭ la naturfortojn kiel estaĵojn similajn al la homoj. **)

Edison en Praha. Niaj legantoj memoras, ke dum kelkaj jaroj la Esperantista Klubo de Praha havis ejon en kafejo nomata Edison. Tiu kafejo, sur ĉefa strato, tuj apud la plej bela strato de Praha, nomata „Placo de Sta Vencslao“, okupis du etaĝojn. La klubejo estis en la dua; en la unua etaĝo, apud unu el la fenestroj estis (la kafejo ne plu ekzistas) enkadrita skribaĵo memoriganta, ke tie sidis Edison, vizifinta en 1911 la urbon Praha. Sed la kafejo portis la nomon de la fama inventanto jam antaŭ lia vizito. Guste la nomo de la kafejo enloĝis lin por sidi tie, kaj en ĝi — espriminte intereson pri tio — li sciigis de la posedanto S-ro Turnovský, ke lia nomo estis elektita kiel neŭtrala, nek ĉefa nek germana.

***) planto = roŝtina, estiĝi = vznikati, plinobligi = zuŝlechti, obsedi = posednouti, sulfuro = sira, hidrargo = rtuť, stano = cín, plumbo = olovo.

La aktorino Olga Scheinpflugová vojaĝas, por fari gastludojn, kun sia servistino, ĉambristino kaj kuiristino (ĉio ĉi en unu persono). Kaj en unu tia vojaĝo bonvenigas ilin, nokte post la teatra prezentado, nehejtita hotelo, frostofreŝa ĉambro, kuseno malvarma, plenŝtopita kaj mallonga. La laca aktorino klopodas kuŝiĝi sin tiel oportune kiel eble. Kaj post momento eksonas en la mallumon, inter dentoklakado: Dddio mmia, ĉu mi estas tiel granda aktorino aŭ la kuseno estas tiom mallonga!

KELKAJ ANEKDOTOJ*)

Infana Eva. Patrino (al fileto): Kial vi batis vian malgrandan fratineton? — Fileto: Ni ludis „Adam kaj Eva“, kaj anstataŭ tenti min, ŝi mem manĝis la pomon.

Vizito. Mastrino: Ĉu vi trinkas la kafon kun konjako aŭ sen konjako, sinjoro Maŝer? — Amiko de la familio: Kun konjako mi petas, sed sen kafejo.

Senkavalira tempo. Ĉu la tramo estis plena? — Plena, ne estas sufiĉa esprimo. Eĉ sinjoroj devis stari.

Oriento kaj okcidento. Kristano (vidante, ke ĉino metas rizan manĝaĵon sur la tombon de sia avo): Ĉu vi opinias, ke via avo manĝos ĉi tiun rizon? — Ĉino: Ĉu vi opinias, ke via onklo, sur kies tombon vi metis florojn, floros ilin?

Nor fiŝkaptas: Instruisto: Nu, infanoj, diru al mi, kion povis fari Noa en sia arkeo, dum li restis en ĝi? — Unu el la knaboj: Mi opinias, ke li povis kaptadi fiŝojn. — Instruisto: Bonege! Certe li povis kaptadi fiŝojn. — Alia knabo: Mi opinias, ke li ne povis kaptadi fiŝojn longan tempon, ĉar li ja havis en sia arkeo nur po unu paro. Ĉu oni povas kapti multe da fiŝoj per du vermoj?

*) Elprenitaj el libreto de C. Walter: **Gajaj vesperoj.** Krom anekdotoj troviĝas tie humorajĵoj, nombro-mirindaĵoj, vortludoj, kalkul-enigmoj, silab-enigmoj, reguloj por ludoj de grupkunvenoj, program-konsiloj por grupkunvenoj, sociaj ludoj ktp. Riĉa materialo, por pli-perfektigi en esperanto — facile kaj lude, Prezo de la 80paĝa libreto estas Kč 8.40 afrankite. Mendu ĉe la Progreso.

Dr. Edm. Privat:
HISTORIO DE LA LINGVO
ESPERANTO

II. ĉast, 1900—1927
199 stran., v plátně vázaná
Kč 48.— vyplaćeně.

TRA LA GAZETARO.

Viva gazeto. Kio estas viva gazeto? Ĝi diferencas de aliaj ordinaraj gazetoj kaj ĵurnaloj per tio, ke ĝi ne estas presata. La kunlaborantoj kaj raportistoj parole prezentas siajn artikolojn al la „legantaro“ (Oni nomas ĝin ankaŭ „vivanta“ aŭ „parolata“ gazeto. R. H.) Ĝi havas redaktoron, kiu redaktas ĝin, kiu havigas la necesan materialon kaj gvidas la prezentadon de la gazetnumeroj. Aŭskultantoj kaj prezentantoj estas anoj kaj gastoj de koncerna espo-societo. Prezenti oni povas diversspecajn artikolojn, ekz. Espos-movado, recenzoj de libroj, lingvaĵoj, eksterlanda kaj enlanda kronikoj, rakontoj, vojaĝaj impresoj, deklamoj, humoraĵoj, ricevitaj leteroj, k. t. p. Por ke ne manku tempo ankaŭ por aliaj aranĝoj, la daŭro de V. G. estu ĉ. 1 horo kaj la artikoloj ne pli longaj ol po 15 minutoj.

La ĉefa kaŭzo, ke la societoj ne scipovis reteni siajn anojn, estis manko de konforma sinkupo en la societoj. La tielnomataj societaj ludoj, kiuj estis fervore praktikataj en societoj, ne kontentigis la anojn. Post ekfunkciado de V. G. malaperis la sento de enuo kaj iliaj anaroj fariĝis pli konstantaj. Multaj personoj vizitas nun societojn precipe por aŭskulti V. G. Ĝi estas unu el la plej efikaj rimedoj por plivigli la societanan vivon kaj plialtigi la aktivecon de la societanoj.

(Informoj de E. A. de Estonio, 109).

KONSTRUO DE ZAMENHOF-MONUMENTO EN BIALYSTOK.

Post la Krakova kongreso estis metita fundamenta ŝtono por la monumento. La monumento estos alta 12 metrojn kaj prezentos grandan Babelan turon. Ĝi estas verko de fama artskulptisto varsovia A. Ostrzeĝa. Por subteni la laborojn, ICK aprobis aranĝi monkollektadon. „Brikoj“ estas aĉeteblaj po 2 Kĉ, kiu donacos almenaŭ 20 Kĉ ricevos specialan dankleteron kaj estos enskribita en la „Oran Libron“

Ĉeĥoslovakoj povas pagi pere de Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista, per blanko-paĝiloj kun nomo de Asocio kaj Nro 9.602. Faru klaran noton: Zamenhofa monumento.

Slovník obchodně-technický, účetní a daňový. Sešit čis. 16—18/IV. obsahuje: Kamenický průmysl - Kameninové zboží - Kamenotiskařství - Kamerální účetnictví - Kamna - Kampaňový úvěr - Kancelář - Kaolinové závody - Kapi: talisace - Kartáčnictví - Kartely. - Slovník obch. zkratek. Expedují Tiskové podniky ú. S. Č. P., Praha I., Masarykovo náměstí. 4. Cena sešitu Kĉ 19.50.

ESPERANTO-MONDO.

En Aŭstria Esperantisto advokato Halbedl, kiu jam protestis kiel katoliko kontraŭ la I. volumo de la grandioza verko „Jarmiloj pasas“ protestas denove kontraŭ la frazo: „Per la morto de la imperiestro Francisko Jozefo, kies postulo Karlo simpatiis al la entento, la helpo de Aŭstrio, malbonhumorigita eĉ sen tio, fariĝis duba“.

La skismo, kiu okazis antaŭ pli ol unu jaro en la internacia organizaĵo de laboristoj — esperantistoj (SAT) kun Sennaciulo estas kompleta. La opozicio fondis sian gazeton „Internacisto“ kaj sian eldonejon (EKRELO). SAT sole kun forta streĉo de fortoj sukcesis eviti aŭkcian vendon de sia havaĵo (libroj) en Leipzig postulan de laborista presejo Neudrag, sekve de ĝia bonhavo, kiu egalas al ĉ. 30.000 Kĉ. Tridek milojn da Kĉ sukcesis rapide kolekti laborista movado por savi sian entreprenon, karaj ĉeĥoslovakaj samideanoj!

„Kiaj estas la kondiĉoj rilate la eksigon el la eklezio en la diversaj landoj“ estas temo de la enketo, publikigita en Sennaciulo Nro 370-371. Respondoj al Adolf Waldmann, Illerstr. 8. Bremen.

Sveda Movado. S-ro Scherer havis en Svedujo (laŭ La Espero, Stockholm) 51 paroladojn (28 publikaj, 4 radio, 12 internaj, 7 vojaĝrakontoj) en 30 lokoj; li kontaktis kun 30 kluboj kaj 25 UEA-delegitoj, vizitis 25 redakciojn. Pri lia vojaĝo aperis tie proks. 300 kontrolataj gazetartikoloj kaj anoncoj.

S-ro Willy Burgemeister, el Warnsdorf, konata al klubanoj en Praha, vojaĝis en Svedlando parolante tie pri sia lando, sia vojaĝo tra Eŭropo kaj Norda Afriko. Nun li komencis Ĉe-kursojn en 3 lokoj de provinco Vermland kun 150 personoj. Laŭ informoj el tie li estas mirinda instruisto, kiu per vigla kaj bonhumora instrumaniero igas la lecionojn tre interesaj.

1355 personoj en Svedlando akiris elementan ateston pri scio de esperanto. La superan diplomon akiris 83 personoj.

SEGIS signifas Sveda Esperanta Gazetara Informa Servo, gvidata de Oskar Svantesson, Göteborg, Postfack 4. Por ke iu gazeto ricevu folion kun novaĵoj estas necese, ke samideano deziranta tion sendu al SEGIS cca 2 Kĉ po folio. Kaj ekzistas tiaj samideanoj — en Svedujo. Kara samideano ĉeĥoslovaka, ĉu vi deziras, ke la gazetoj de via loko skribu pri esperanto? Anoncu vin ĉe S-ro O. Ginz, Praha-II. Stárkova, 4 kaj vi ricevos ĉion necesan — senpage, ĉar la centro — CAE — pagas tion.

PERSONAJ INFORMOJ.

S-ro Antonín Kudela, en Olomouc, Prez. de Esperanto-Societo, Komitatano de ĈAE kaj UEA-delegito, estis nomita Honora Membro de UEA. S-ro Kudela jam de 1910 funkcias kiel Delegito, fidele kaj persiste. Lia urbo estas eble la sola, kie po 1000 loĝantoj estas unu ano de UEA. Se tia proporcio ekzistus en ĉiuj 3000 lokoj de UEA, ni havus pli ol 50.000 membrojn. — Ni gratulas sincere al S-ro Kudela kaj deziras al li ankoraŭ multajn jarojn de tiel sukcesa laborado.

S-ro Vuk Ečhtner, redaktoro de blindula gazeto „Ātroro“ kaj F-ino Tonicĉka Richteroová, la konata „Sunradieto“, fariĝis geedzoj la 17. Septembro 1931. Ni kore gratulas esperante, ke nia diligenta paro en laboro paca ne laciĝos.

Sro Scherer
en la redakcio de la Progreso.

S-ro Scherer, vizitinte nin en la redakcio diris al ni afable kelkajn ciferojn, tre interesajn, pri sia vojaĝo, kiujn li citis el sia taglibro, zorge skribata kaj interese konservata. Li komencis sian vojaĝon la 17. Septembro 1930. Ĝis la tago de sia veno al ĈSR (la 25. Oktobro), li estis vojaĝanta 404 tagojn, en kiuj li havis 203 paroladojn, inter ili 15 en radio. En Leipzig hazarde okazis lia 200-a parolado, ĝuste en la 400-a tago de lia vojaĝo. Li vizitis 188 urbojn kaj 800 gazetartikolojn pri sia vojaĝo li mem vidis. Al nia demando, li respondis, ke en tiu nombro ne estas kompreneble la artikoloj, kiuj aperis en Ĉeĥoslovakio jam antaŭ lia alveno.

*

Pri la lastaj okazintaĵoj en Ĉinio informas la Komitato por internaciaj rilatoj, 5, Mao-tan strato, Nanking, Ĉinio. Al seriozaj interesitaĝantoj, kiuj povas promesi laŭcelan uzon, la komitato senpage sendos informojn pri la malĝojaj aferoj okazantaj en Oriento. En jaro 1928 estis eldonita tie esperanta broŝuro pri la Santuna demando, nun aperis ilustrita libro „Incidentoj en Vanpaoŝan kaj la kontraŭĉinaj tumultoj en Koreo“ skribita en angla lingvo. Jurnalistoj povas ricevi ankaŭ senpage la kajerojn de la anglaj revuoj „Chinese Affairs“ kaj „The Chinese Nation“ kaj havigi tiel al si senpere sciigojn pri la gravaj problemoj ĉinaj. La komitato eldonas en esp-o ciklosrilitan Bultenon: Orienta-Gazet-Servo.

Kume aŭ dise?
II.

En la kunveno de la Esp. Klubo de Praha okazis la 13. XI. debato pri la nova „Neŭtrala Centro de Esperanto en Praha“, nova firmo de S-ro Bloch. Tiu ĉi rifuzis doni informojn, kiam kaj kial li fondis tiun ĉi „Centron“ apud la 30jara loka centro Esp. Klubo, kies li estas cetere membro, kaj apud la reĝna centro ĈAE. La kunveno severe riproĉis, ke individuo donas al si titolon „Centro“. Tiu melojala agado nur vekas falsan impreson ĉe la publiko neesperantista kaj eĉ ĉe esperantistoj mem. Tia agado la klubo ne toleros kaj entreprenos ĉion necesan por forigi la malutilon, kiun ĝi povas alporti al la movado.

Al tiu informo ni nur aldonas, ke la situacio de la fervoraj laborantoj en Praha efektive ne estas enviinda. Antaŭ du jaroj ili juste taksis la propagandon de apostolino Biske. Apenaŭ ili sukcesis iom rebonigi ĉion, post ŝia arestigo, novaj zorgoj troviĝas.

Dopis mladiĉké esperantistky.

Vážená slečno!

Tatiček mi ŝekl, abych Vám napsala něco o tom, jak jsem se učila esperantsky. Chodím do IV. třídy Masarykovy obecné školy v Hradci Králové. Začala jsem se učit esperantsky před rokem. Nejprve jsem do učení neměla chuti, ale když tatiček ŝekl, že pojedeme do Lázní Bělohradu, učili jsme se s bratrem Otou mnohem pilněji. V Bělohradě bylo mnoho cizinců. Měla jsem radost, že jsem se s nimi dorozuměla. Škoda, že tam nebyli děti cizinců, které by uměly esperanto.

Když byl 25. července slavnostní večer na uvítání cizinců, oblékla jsem si náš národní kroj a hosty jsem esperantsky přivítala, jak mi to tatiček složil. Všichni se zajímali o můj kroj. —

Jak by bylo hezké, kdyby všechny děti na světě mluvily esperantsky!

Eva Sklenčková.

V Hradci Králové 8. září 1931.

Z rubriky „Esperantem do světa“ v časopisu Mladý svět, 13. X. 1931. Dopis zaslaný redaktorem této rubriky.

REDAKCIA.

Krom aliaj aferoj, jam kompostitaj, ni devis prokrasti recenzojn, inter ili pri Oficiala jarlibro kaj pri la libro de Jan Welzel. — La traduko de la 30. teksto aperos venonte, sendu al ni vian tradukon! Ankaŭ la daŭrigo de Nĉo pro samouky a kursy. —Atentu la librajn anoncojn en la 7-a nro!

BULTENO

DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA, PRAHA VII. SOCHAŘSKÁ 333.
NUMERO 40. - DECEMBRO 1931.

LA 6. KOMITATA KUNVENO DE ĈAE

okazis lunde la 23. XI. 31. en Praha, kafejo Louvre. Ĉeestis S-roj Ginz, Herzigová, Janda, Dr. Pitlík, Slavík, Staněk, Sustr, Vostrubec. Senkulpigis sin: Hromada (malsana), Sedláček, F-ino Tarantíková. Protokolis S-ro Slavík, daŭro 20.30 horo — 23.30 horo. —

El la protokolo ni citas koncize:

Ŝtataj ekzamenoj pri esp-o.

Ĉe la ŝtata ekzamena komisiono en Praha faris la 16. XI. ekzamenon kun bona sukceso S-ro Aug. Adam, faka instruisto en Česká Skalice.

Studenta Sekcio.

S-ro dir. Fridrich el Brno verkis tre efikan flugfolion „La lingvo internacia en la servo de la studentaro“. Ĝi estos presita en Bulteno (januara) kaj 500 specialaj kopioj estos disponigitaj al la S. S.

Ekspozicia materialo.

La nuna kolekto ne sufiĉas por samtempa pruntedono al kelke da lokoj, ĉar jam parte neuzebla. Membroj estas petataj donaci ekspoziciaĵojn. Krome, la komitato mem zorgos havigi flin.

Esperanto-propagandilo pri Sokolaj Festoj en Praha 1932

estos eldonita de la Festkomitato en kvanto de 10.000 ekz. Subvencias la ministerioj de l' Eksterlando kaj Komercio. ĈAE kontrolos la tekston.

Gvidfolio pri Praha.

Venis dankaj leteroj de la ministerioj, kiuj estis informitaj pri nia eldono de la gvidfolio. La ministerio por eksterlando mendis 150 ekz. — La urbestro de Praha subvencias ree la duan eldonon, nun preparatan. ĈAE danke aŭdos proponojn por la dua eldono.

Internacia Transportlaborista Federacio

havos sian kongreson en 1932 en Praha. Ĝi jam nun uzas praktike esp-on kaj eldonas esp-an bultenon. S-ro Josef Pech el Plzeň estas nomita esp-a eksperto por la kongreso. Ni proponos niajn servojn al la organizaĵoj en Praha.

Diversa:

Pri la brilaj rezultoj de la Scherer-vojaĝo ni raportos venonte. — Pri nia 5. kongreso en Olomouc ni informis ICK, UEA kaj la redakcion de la Listo de okazontaĵoj porfremdulaj en ĈSR, eldonota de la Komerca Ministerio. — Pri la membra kunveno en Brno vidu apartan artikolon. — Laŭ deziro de ICK ni diskonigos en la ĉsl. gazetaro la informon pri la novaj poŝtkartoj de Liechtenstein kun espo-teksto. — La prezidanto sendis por informo de la komitato liston de siaj korespondantoj (120 numeroj). — Internacia Laboratorio por Arteduko en Kanagawa (Japan.) petas kunlaboron kaj materialon. Prizorgos S-ro Sustr. —

Okaze de la datreveno de la naskiĝtago de Dro Zamenhof ni klopodos aranĝis disaŭdigon de la himno el radio-stacio Praha. — Pri vizito de S-ino Ith-Danneuil vidu la ĉefartikolon en nro 7-a. — Kofize membra al Konsilantaro de la etikaj societoj (Kĉ 30) por 1931 estos pagita. Niaj membroj abstinuloj kaj nefumantoj rajtas ricevi rabaton asekurigante sin ĉe Slavia aŭ Pražská městská pojišťovna. — S-ro Ing. R. Novák el Plzeň sciigis nin pri la informo donita de li al la Kom. Ĉambro de Plzeň. — Multaj kluboj ricevos de ni peton pri regula informado al nia Bulteno. — Propagandaj poŝtkartoj kun landkarto de la respubliko, laŭ propono de F-ino Šupichová, estas preparataj.

Membra kunveno de ĈAE en Brno.

Nia prezidanto petis E. Klubon en Brno kunveniĝi aktivajn esperantistojn el la urbo la 8. XI. je la 1/2 11. La klubo tre afable plenumis la peton kaj anoncis la kunvenon en sia Bulteno, dissendis specialajn invitilojn kaj anoncis la prelegon en ĵurnaloj. Kunvenis en la klubejo, kafejo Passage, 26 partoprenantoj, al kiuj dr. Kamaryt raportis pri nuntempaj organizaĵaj problemoj kaj invitis la ĉeestantojn por diskuto pri la skizitaj aferoj. La diskuto estis tre vigla. Partoprenis ĝin gesamideanoj Strejčková, Vondroušek, Strejček, Valka, Sonnenfeld, Friedrich, Bačura kaj aliaj. La ideoj en ĝi esprimitaj montris samideanan interecon pri progreso de nia organizo kaj proponoj faritaj estos studataj de la komitato. La samideana klubo en Brno meritas nian dankon pro bona aranĝo de tiu ĉi kunveno.

MOVADO EN ĈEHOSLOVAKIO

Strato de dro Zamenhof kaj Placo de Esperanto en Praha.

La urba konsilantaro de Břevnov (kvartalo Praha XVIII.) rekomendis en sia komitata kunveno de la 14-a de septembro 1931 al la Centra urba konsilantaro de Praha doni al ĉu strato nomon de dro L. L. Zamenhof por honori la kreinton de internacia lingvo esperanto kaj nomi iun placon Placo de Esperanto.

FERVOJA RABATO POR PARIZO.

Ministerio de fervojoj informis nin, ke estos donita 33% fervoja rabato por kongresanoj vojaĝantaj tra Ĉeĥoslovakio. La saman rabaton havos la ĉeĥoslovakaj kongresanoj.

La kosto de rabatilo estas Kč 4.50 por la tria, Kč 9.— por la dua klaso plus poŝtel-spezoj.

La kongresanoj ricevos post aliĝo ĉiujn detalojn.

Kursoj de esperanto en ĉsl. gazetoj.

En „Slovíčko“, dimanĉa porinfana aldono al ĵurnalo „České Slovo“, aperas ankaŭ post la libertempo la esperanta kurso de F-ino Supichová. — En „Mladý Svět“, alia porinfana gazeto, aperas kurso, kiun ankaŭ redaktas F-ino Supichová. — „Národní Politika“, la plej disvastigita ĵurnalo, ĉiam ankaŭ publikigas unu fojon en semajno — ordinare en eldono por la tuta respubliko (ekster Praha) — informojn pri la novaĵoj en la „Esperanto — Mondo“, liveratajn de F-ino Supichová. — Kalendario de la supre nomita „Slovíčko“ por 1931 havas sun du paĝoj artikolon (de F-ino Supichová pri esperanto. — En „Rozsevač“ aperas ĉiumonate kurso de prof. Urban.

Praha. La 25. IX. vizitis la Esp. Klubon Pastro J. Font Gáralt kaj parolis tie pri liberiĝo de Katalunoj. La klubo donacis al li ĉsl. flagon, kiun la gasto emocie kisas kaj rememoras la katalunan flagon nun libere flagrantan en lia patrujo.

La 2. X. en la klubo „unua parolanta filmo de ĉeĥa deveno“! Fabrikaĵo de firmo Sustrmount kaj Staněkpictures! Tiaj surskriboj aperis sur la ekrano... Ĉiuj ridante atendas... Sur la ekrano aperas siluetoj de la klubestro Sustr kaj la vicklubestro Staněk, ili ĝestas, iliaj lipoj moviĝas, sed anstataŭ ili parolas apude en malumo staranta gramofono kun disko, speciale fa-

brikita, kun iliaj voĉoj, perfekte rekoneblaj. La temo estas „la hodiaŭa senprograma vespero“, tre sprite verkita, kun ŝercaj aludoj al kelkaj ĉeestantoj eĉ al la kelnero priservanta. La taskon de la disko elĉerpiĝinta transprenas poste senrompe la du sinjoroj. Tre bona ideo, kiu vekis multe da amuzo. La cetero de la vespero estis plenigita per aŭdigo de kelkaj gramofonaj diskoj en esperanto.

La kvar vendredoj dum oktobro estis okupitaj per debatoj pri diversaj temoj kaj precipe pri la parolado de S-ro Scherer, aranĝata de la Klubo.

Brno. E. Klubo dum nova gvidado reviviĝis kaj nova vigleco eniris en ĝian internan vivon. Samideanoj s-rino Strejčková, s-roj Strejček, Vondroušek, Samla, Sonnenfeld, Baďura kaj ceteraj laŭplane kaj energie zorgas, ke ne perdiĝu lokaj fortoj. Depost septembro okazas la klubaj kunvenoj en aparta ejo de kafejo Passage ĉiun mardon vespere kaj estas regule vizitataj de 20 — 30 anoj; por ĉiu kunveno estas preparata programo (prelego, diskuto, komuna ludo kaj simile). Ciklostilata klubo Informa bulteno, liverata senpage al ĉiuj anoj multon helpas por firmiĝi inter la membraro (ĉirkaŭ 80) konvinkon pri la klubo solidareco kaj kunagado; redaktas ĝin s-ro E. Sonnenfeld, multoblasas s-ro Strejček. En novembro 1931 aperis ĝia 9-a numero. La klubo kunvenadis ankaŭ dum la libertempaj monatoj (en kafejo Slavia) kaj akceptis dum julio kaj aŭgusto fremdlandajn samideanojn 3 el Germanujo, 3 el Italujo. Inter ili speciale menciinda estas s-ro Zscheile, redaktoro de „Woche“, ĉirkaŭvojaĝanta la mondon, kaj s-ro Meazzi, direktoro de turisma propagandejo en Italujo. Laŭdan mención meritas ankaŭ zorga kunlaboro de la klubo kun nia Asocio, kio estas videbla el saĝa plenumado de taskoj proponataj en niaj ĉirkuleroj kaj Bulteno. Al publika kurso komencita en oktobro en kadro de Propaganda semajno aliĝis 9 komencantoj kaj 5 klubanoj uzontaj ĉiun okazon por refreŝigi siajn sciojn; ĥvidas ĝin s-ro Vondroušek, Prezidanto de la klubo estas s-ro Kr. Baďura, polica inspektoro.

Regiona Ligo Silezia havis sian kunvenon printempan la 14. Junio 1931 sur la monto Čantoria; partoprenis 43 p., inter ili 10 el Polujo. Ĉar S-ro Slanina transloĝis al H. Litvínov, kiel sekretario funkcias S-ro Skulina. — Alia kunveno okazis la 12. Julio sur monto Javorový (34 p.). Prof. Pamporov el Sofia rakontis pri siaj vojaĝoj kaj pri sia lando. — La 30. Aŭgusto kunvenis sur monto Stožek 10

samideanoj. La korekta regularo de la ligo estis aprobita. — Oficiala fonda kunveno okazis la 20. IX. en Český Těšín (38 p.). Komitato konsistas el: prez. Krysta, sekr. Hladký, kas. Skulina, bibl. Petrák, revíz. Adámek, kaj Křetínský. Kotizoj: aliĝpago 2 Kč, jarkotizo 6 Kč plus libervole Kč 2.50 por afranko de la invitiloj kaj raportoj al la membroj sendataj. Anstataŭ verdaj membrokartoj estis prizorgitaj la ruĝaj. — Laborkunsido okazis la 18. X. en Mor. Ostrava (29 p. el 17 lokoj). Ligo havas ĝis nun 80 membrojn. — Oni traktis pri paroladoj de S-ro Scherer en Mor. Ostrava kaj Těšín, S-ro Křetínský klopodis aranĝi ankaŭ radio-paroladon de sro Scherer en Mor. Ostrava. Sensukcese, ĉar kutime la stacioj postulas la manuskripton jam unu monaton antaŭe. Eble okazos radio-parolado de Sro Křetínský: Servo de espo en ĉsl. turismo. Laŭ atentigo de ĈAE-sekretario Sro Ginz, Sro Křetínský klopodis, ke Sro Scherer parolu en Mor. Ostrava ankaŭ por la ĉefa publiko, kaj eble ankaŭ por studentoj.

INTERNACIA LIBERTEMPEJO en Lázně Bělohrad.

En Lázně Bělohrad, negranda banloko en norda Bohemio, proksime al la montaro Krkonoše (de Giganto) la tiea Turista Klubo, laŭ propono de la UEA — Ĉefdelegito S-ro Sklenčka en la proksima Hradec Králové, aranĝis Esperanto — Libertempejon. En la loko loĝis dum julio kaj aŭgusto entute 39 personoj el 8 landoj. Ili estis tre kontentaj pri la loko, la ĉirkaŭo kaj la samideana societo.

Sabate la 25. Julio okazis en la banloka restoracio amika vespero, kiun partoprenis kaj en kiu salutis la urbestro kaj reprezentantoj de la lokaj korporacioj. Respondis S-ro Karsch el Dresden, vicprezidanto de UEA, S-ro Hans Jakob, Direktoro de UEA, el Genevo, Sro eksministro Sievers el Braunschweig k. a. La intima vespero estis malfermita per esperanta saluto ĉarme prezentita de Eva Sklenčkova, filino de la Ĉefdelegito. Dum ĝi F-ino Vinčáková recitis esp. tradukon de Maryčka Magdónová.

Dimanĉe la 26. Julio ĉiuj partoprenantoj enskribiĝis, laŭ la peŝo de la urbestro, en la memorlibron de la urbo. Ĉe tiu okazo la urbestro donacis al S-roj Karsch kaj Sklenčka du albumojn kun bildoj de Bělohrad, por danki al la eksterlandaj gastoj kaj la enlandaj kunlaborantoj.

La 26. kaj 27. Julio kunsidis en Bělohrad S-roj Karsch, Rockmann, Jakob kaj Hromada,

kiel komisiono por esplori la laborojn, kiuj venis laŭ la konkurso de UEA pri la plej bona propagandilo.

Multaj samideanoj germanaj, intencantaj veni, estis malhelpitaj pro la alta takso de 100 M, en tiu tempo ordonita en Germanio, al la vojaĝantoj ekster la regnon.

La Klubo de Turistoj en Lázně Bělohrad eldonis kiel propagandilon por la Libertempejo 12 paĝan (11×16 cm) gvidlibreton pri sia loko, kun multaj praktikaj informoj. La 1000 ekz. de la libreto estis alĉerpitaj jam printempe.

La tutan aranĝon ni dankas al la iniciato de S-ro Blumauer, la granda helpo de gesinjoroj Sklenčka kaj la kunlaboro de S-ro Vinčálek, Hrnčíř, F-ino Vinčáková k. a.

P. JOAN FONT GIRALT.

En Brno li parolis en salono de Zdislav 26-an de septembro pri nuna stato ekonomia kaj politika en Hispanujo, 27-an havis matene je 1/49 esperantan predikon en preĝejo de s-a Miĥaelo kaj poste legis meson. —

En Bratislavan li venis la 28-an, estis akceptita de s-ro Macek, vizitis la urbajn vidindaĵojn kaj 28-an vespere havis en la Esperanto-Klubo prelegon pri Nuna situacio en Hispanujo. Ĉeestis 23 esp-istoj, ĉar oni pro malfrua informo pri alveno ne povis fari sufiĉan propagandon. La 30-an matene li ekveturis hejmen tra Wien.

ĈSL. TISK A ESPERANTO.

La unua kaj lasta elfrovo de Edison, traduko el espo de O. Ginz en Rozkvět nro 4-1951.

List říšského svazu učitelstva čs. 24. X. du paĝoj pri espo de J. Šupichová.

Železniční zřízenec 1. IX. Esperanto en la kongreso de la Transportista internacio. Longa informo artikolo pri la kongreso okazonta venontjare en Praha kaj pri kunlaboro de esperantistoj.

En Nové časy Bystřice pod Hostýnem ni vidis ripete bone gvidatan esperantan angulon kun informoj pri progresado de nia lingvo.

20 jaroj de laboristaj esperantistoj. Nová Doba. Plzeň 27. X. raportas en dukolona artikolo pri la jubileo de la Laborista klubo esperantista en Plzeň.

Sub la titolo „Kiel fartas esperanto“ raportas Právo lidu 6. XI. pri multaj novaĵoj esperantaj ĉefe el laborista movado.

Věstník hlavního města Prahy. (Bulteno de la ĉefurbo Praha) de la 19. IX. informas pri la propono de la kvartalo Břevnov nomi en Praha Straton de dro Zamenhof kaj Placon de Esperanto.